



Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Franclingvaj Esperantistoj

J A R A B O N O

Jarabono : 80 fkoj

P. BABIN

Le Haut des Bourrellières
17, rue Romain-Rolland
85100 Le Château-d'Olonne
P.C.K Nantes : 2.813.61 L

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1999 - 2


APRIL-MAJO-JUNIO

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... Kia infancco signas infanaron ?



... Kaj nobeleco kaj nobeliĝo.

KULTURAJ KAJEROJ

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

REDAKCIA KOMITATO

Jeannine VINCENT
26bis, rue de Milngavie
FR-49150 BAUGE

Pierre BABIN
17, rue Romain Rolland
FR-85180 CHÂTEAU D'OLONNE

ENHAVO

	paĝo
El Grésillon	1
Esperanto tra la Mondo	2
Infaneco kaj infanaro	3-6
Nobeleco aŭ nobeliĝo	7-8
Lingvo "OC" kaj Esperanto	9-12
Neatendita destino	13
Por via Distro	14
La Vivo en Grésillon	15-16

La suba letero estis legata dum la kunveno de la Komitato, la 1an de majo 1999. La eksprezidanto verkis ĝin por precizigi la kialojn de sia sinteno kaj eviti ne tute ĝustajn interpretojn. Ĉiuj membroj de la asocio rajtas ĝin koni.

...Jen la nuna situacio, tia kia mi konas ĝin. Mi provos silentigi la sentimentalan aspekton, kiu, nun de preskaŭ 50 jaroj, ligas mian familion kaj mi al la kastelo.

Mi opinias, ke la Asocio pli gravas ol la loko, kie disvolviĝas ĝiaj aktivaĵoj. Sen la Asocio la kastelo Grésillon ne ekzistus por la esperantistoj; sed sen la kastelo la Asocio povus organizi siajn aktivaĵojn en alia(j) loko(j). Jes, Grésillon estas privilegia, belega loko. Plie ĝi povas akcepti ĝis 80 personojn. La hotel-restoracia flanko al kiu aldoniĝas la libro-servo kaj la butikoj estas la nuraj mondonaj vivrimedoj. Pli kaj pli granda estas la parto de la profito elspezata por la prizorgado de maljuniĝanta konstruaĵo. 400 000 frankoj estis ŝparitaj por la nepre necesaj prizorgaj laboroj. Vi konas la destinon de tiu sumo. Bedaŭrinde kvankam la elspezoj ordinaraĵ kaj neatenditaj kreskas, la enspezoj tendencas malkreski, paralele kun la nombro da ĉeestantoj, verŝajne pro la multigo de mallongaj renkontoj. Kiamaniere mildigi tiun mankon de la esperantistaro? Ĉu "pagigi la neesperantistojn"? Antaŭ pluraj jaroj, asocioj, sindikatoj, vojaĝagentejoj organizis restaĵojn aŭ tranoktadojn en Grésillon. Neniu (krom la Popoluniversitatoj) venis dufoje. Kial? La respondoj estis: "la loko estas belega sed la komforto ne taŭga". Kreskigo de la enspezoj per tiu rimedo eblas nur se la akcepto estas modernigita kaj konstanta deĵoranto dungita. Estu saĝe kalkuli kun tiuj faktoj.

La 07an de julio 1998 la komitato proponis al la membroj de la asocio tri solvojn; neniu el ili ricevis la plejmulton da voĉoj (pli ol 50%) Neniu el la proponoj estis simpla; neniu estas certa. Mi opinias, ke la malplej danĝera por la Asocio estis la 3-a propono: akcepto de alia bieno malpli granda, pli proksima al la landlimoj, pli bone provizita je komunaj vojaĝrimedoj, pli facile prizorgebla kaj normigota, aŭ ĉiujara serĉado de oportuna ferio-centro, kiel faras aliaj esperantistaj organizaĵoj.

Konklude, sentimentala vidpunkto ne alportos solvon. La Asocio povas pluvivi. La kultura flanko estas afero de homa kompetenteco kaj sindonemo; sed la akcepta flanko, restoracio kaj hotelo, kiu subtenas la kulturan aktivadon konsistas el entrepreno, kiu bezonas enspezojn pli ol elspezojn. Se malkreskos la enspezoj necesas samtempe malkreskigi la elspezojn, kiuj kovras grandparte la prizorgadon de la konstruaĵo. La komisiono pri sekureco postulas laborojn multelspezajn. Ĉu la Fonduso Sekureco alportos sufiĉe da mono? Ni ne forgesu, ke la komitato, la 7-an de julio 1998, promesis "uzi la donacojn nur se (ni) certas havi sufiĉe por ĝisfine fari ĉiujn prilaborojn". Mi elkore deziras, ke la Asocio "Maison Culturelle des Espérantistes Français" fondita de Micard kaj grupo da geamikoj, konservu sian agpovon, serve al Esperanto, eĉ se la solvo elektita estos doloriga.

ESPERANTO TRA LA MONDO

RENKONTOJ : - 33-a ILEI-Konferenco pri la temo: "Edukado al la Paco", en Karlovy Vary (Ĉeĥio), 7-13a de aŭgusto.

-28an de aŭgusto-4an de septembro: Internacia Semajno en Sète (Francio). Adreso: Esperanto, 5 rue Docteur Roux, FR-34040 Montpellier.

-4-10an de septembro: Internacia Turisma Semajno en Malto. Adreso: Malta Esperanta Societo, P.O. Box 132, Valletta CMR 01.

-En 2000 la Internacia Junulara Kongreso okazos verŝajne en Hongkongo, aktive preparata de Hongkonga Junulara Esperanto-Asocio.

ESTONTAJ UNIVERSALAJ KONGRESOJ-

En la jaro 2000, la universala kongreso de UEA okazos en Tel-Aviv, Israelo, sed kun ŝanĝo en la dato: 25an de julio - 1-an de aŭgusto.

En 2001 ĝi okazos en Zagreb (la afiŝo estis jam proponita en Montpellier). Por 2002 kondiĝas Brazilo kaj Belgio.

AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCŬOJ-

Same kiel dum la mezaĝa epoko, la studentoj retrovis en ĉiuj eŭropaj universitatoj instruadon en la latina lingvo, la partoprenantoj de la sesioj aranĝitaj de AIS en diversaj datoj kaj landoj aŭskultas prelegojn en esperanto. Eĉ fondiĝis filio de AIS en Meksikio. En 1999 okazas konferenco en Bydgoszcz (Polio) kaj en San-Marino-Rimini (Italio), kun kompleta programo de kursoj kaj ekzamenoj.

STUDKURSOJ PRI INTERLINGVISTIKO-

La universitato de Poznań (Pollando anoncis eksteran postdiploman studadon 3-jaran sub gvido de D-rino Ilona Koutny. Surloka kurso okazos ĉiusemestre. Informoj: D-rino Ilona Koutny, lingvistika instituto de Universitato Adam Mickiewicz Miedzynhodzka 3-5, PL-60-371 Poznań.

Same, en la universitato ELTE de Budapeŝto, oni povas aliĝi al 3-jara kurso diplomiga pri interlingvistiko kaj esperantologio ĉe katedro pri lingvistiko, kun D-rino Zsuzsa Varga-Haszonits. Informas: Universitato ELTE, esperanto-fako, Pia-rista kőz 1, HU-1061 Budapest, Hungario.

INDIGENAJ DIALOGOJ-

La responsuloj de la Lerno- kaj Lingvoinstituto Narwal en Wassenaar, apud Hago (Nederlando), iniciatis la projekton "Indigenaj dialogoj", kiu celas doni rimedojn al indigenaj organizoj rilati kaj kunlabori dank'al esperanto. De nun du staĝoj, ekde septembro, estas antaŭviditaj. La projekto ricevas subtenon de Nederlanda Centro de Indigenaj Popoloj kaj de Internacia Instituto por Komunikado kaj Evoluo. La adreso estas: Sylvain Lesage kaj Bessie Schadee, Narwal, Oud Clingendaal 7, NL-2245 CH, Wassenaar.

PROJEKTO DE ARTA FESTIVALO-

EUROKKA, kiu publikigis novan katalogon de diskoj kaj kasedoj proponas organizi Kulturartan Festivalon Esperantan, en Toulouse (Francio), dum la unua semajno de julio 2000. Sub la marko Vinilkosmo, EUROKKA permesis la eldonon de jam kvar KD en la serio 2000, inter kiuj la disko de 6 kantopoj de Brassens, kantitaj en esperanto far Jacques Yvart. Adreso: EUROKKA, FR-31450 Donneville.

VIDBENDOJ-

"Esperu despere": tri unuaktaj dramoj pri nia lingvo 110-jara. 5 aŭtoroj: Szathmari, Baghy, Silfer.

"Kiam Parizo estis Parizo ankaŭ por ni esperantistoj", muzika videbendo originala en esperanto.

KELKAJ NOVAJ ELDONAĴOJ-

"La paneo kaj aliaj noveloj", dek-du noveloj de Serĝo Elgo.

"Higieno de l'murdisto", romano de Amelle Nothomb, tradukita de Armela Le Quint kaj Jak Le Puil.

"Serĉu kaj vi trovos!". Krimromaneto de la konata esperanto-verkisto hungara Istvan Nemere.

"Vivo kaj morto de Wiederboren", 12 noveloj de pluraj esperantistaj aŭtoroj.

"Noveloj el antikva Ĉinio". 46 noveloj, kiuj donas historian perspektivon pri la evoluo de la ĉina literaturo.

"Franz Schubert - Muzika albumo". Bindita ilustrita 28-paĝa libro plus 60-minuta kompaktdisko.

"Tri rakontoj por la Miljara paco". Tri noveloj de John Francis.

Kia infaneco signas infanaron ?

1979 estis la "jaro de la infano", sed, laŭ la nacilingvaj esprimoj, oni povas diverse kompreni la vorton "infano": ĉu temas pri la karaktero komuna al ĉiuj infanoj, tio estas "infaneco"; ĉu temas pri la tuto de la infanoj, la "infanaro", rigardata kvazaŭ ĝi estus popolo? Kaj, je tiu punkto de la pripensado, oni rajtas sin demandi, ĉu la infanaro, kiu estas konkreta realaĵo, vere respondas al homogena amaso, kies eroj havas samajn karakterojn, tiujn de infaneco? Por esplori tiun demandon, mi unue revuus la statusojn de la infanoj en la diversaj homaj socioj, kaj due mi provos listigi la sciencajn karakterojn de infaneco por rilatigi ilin kun la statusoj. Fine mi prezentos problemaron, kiu rilatas al la nuna situacio de la infanoj, kaj kiu pravigas la ekziston de jaro de la infanaro.

La infano kaj la socio— Kiam oni super-rigardas la diversajn statusojn de la infanoj en la socioj, oni povas opozicii du situaciojn: kiujn mi karikaturos per tiu esprimo: "de la sklava infano al la reĝa infano".

La sklavigita infano— En la diversaj socioj, kiuj antaŭas tiun de la 18-a jarcento en Eŭropo, la infanoj estis rigardataj kiel ankoraŭ nekapablajn homojn, kiuj povas pli malpli partopreni la taskojn de la plenkreskuloj, kaj devas kiel eble plej rapide fariĝi kompletaj kunlaborantoj. En la plej primitivaj socioj, kiam la viroj rikoltis kaj ĉasis dum la virinoj zorgis pri manĝaĵoj kaj vestoj, tiam la infanoj restis kun la virinoj, for de la viroj kaj de iliaj pli malpli magiaj ritoj. Iam, en la junaĝo, la knaboj ricevis specialan magian edukon, kiu permesis al ili eniri la grupon de la viroj, kaj de tiam partopreni plenrajte.

En la urbaj civilizacioj, kie la profesioj estis multe pli diversaj, kie ekzistis klasoj kaj kastoj tute apartaj, la infanoj ricevis destinojn ankaŭ diversajn. En la malriĉaj klasoj, kie la homoj devis uzi kiel eble plej frue la helpojn de la infanoj, nur la tre junaj vivis kun la virinoj, de kiuj ili estis prizorgataj, sed kiel eble plej baldaŭ ili fariĝis helpantoj, aŭ sur la kultivataj kampoj, aŭ apud la brutaro, aŭ en la laborejo de metiisto. Tiu helpo estis samtempe preparo al laboro, kaj pro tio, la geknaboj estis ne malofte senditaj al "mastro", kiu samtempe estis instruisto pri la profesio kaj labor-donanto por malbone pagitaj kunlaborantoj—

lernantoj. Kiam la gepatroj estis riĉaj, tiam la infanoj povis ĝui pli longan edukon, sed ĉiam cele al profesio. Generale nur la knaboj ĝuis edukon preparantan al profesio, iam en la greka gimnazio por iĝi lertaj soldatoj, iam en religiaj medioj por iĝi pastroj, iam en lernejoj por iĝi juristoj, politikistoj, komercistoj, ktp.

Tia situacio, en la regionoj, kies historion oni detale konas per skribitaj tekstoj, ekzistis en la orientaj imperioj, en la greka, kaj poste en la romia civilizacioj. En la eŭropa Mezepoko, la plej kleraj kaj riĉaj sociaj tavoloj malaperis, sed fundamente, la socia strukturo restis sama ĝis la 18-a jarcento. Kiel ni vidos aliloke, estis granda evoluo en Eŭropo inter la 16-a kaj la 18-a jarcentoj, sed eĉ en la 19-a kaj en la komenco de la 20-a jarcentoj, tiu sklavigo de la infanoj daŭris en la malriĉaj klasoj. Spite al filozofiaj tezoj, la ekonomia premo deigis la familiojn al tiu ekspluatado de la infanoj.

Resume oni povas klarigi tiun bildon per du ideoj: unue, la infanoj estas malfortaj homoj, kiuj kostas al la dunganto, kaj kiu, pro tio, devas kiel eble plej labori, tio estas la sklava bildo de infanoj; due la infanoj estas estontaj homoj, kiujn oni tre zorgigite preparas por la ekonomia rolo en la socio. Utilas rimarki, ke tiu sklava karaktero ligiĝas al malriĉeco de la socio; la infanoj de riĉuloj, kvankam ne perfektaj homoj, tamen disponis pri iom da libera tempo. Ili estis liberigitaj laŭmezure ke iliaj gepatroj povis aĉeti sklavojn aŭ servutojn ĉe tiucela vendejo.

Kiu filozofio pravigas tiun situacion?— Baze de filozofio, ĉiam kuŝas ekonomiaj kondiĉoj. Mi jam montris, ke en la malriĉaj medioj, la frua uzo de infanoj en la produkto estis necesa. En la riĉaj klasoj de la imperio, dank'al la sklavigo de aliaj popoloj, tiu neceso estis malpli urĝa, kaj nur tiu "riĉeco" permesis tiam pripensi pri "homa klerigado" fare de filozofoj. En la antikvaj civilizacioj la filozofoj elpensis klerigadon pure homan por la riĉuloj, kiuj povis atendi antaŭ ol uzi la laborforton de la junaj homoj. Sed poste venis en la romia imperio la kristana influo, kaj dum la mezepoko restis nur la kristana filozofio en Eŭropo. Post la mezepoko, en renesanca periodo, denove kleruloj pensis pri pure homa edukado, sed restis du obstakloj: la malriĉ-

eco, sed aliflanke la kristana filozofio, pri kiu necesas paroli.

Por la kristana filozofio, la homo estas kreita de Dio, pura, naŭva kaj vivis feliĉa en Paradizo. Sed, pro la origina peko, la homoj estis forpelitaj de la paradizo kaj estis malbenitaj; tio signifas: unuaflanke ili estas kulpaj; duaflanke ili nepre devas labori por vivteni sin. Poste Kristo venis, kiu per sia martiro "savis la homojn, kiuj kredos lian parolon". Tiam la situacio estas tre klara: la infanoj naskiĝis markitaj de la origina peko, ili estas denaske kulpaj, kaj la ununura vojo al la savo estas sekvi la instruon de la klerikaro: "estas neniuj savo for de la sankta eklezio". Same kiel la praaj infanoj estis nekapabluloj, ĉar ili ne lernintis la ritojn, tiel la kristanaj infanoj, malgraŭ frua bapto, restas iuj nekompletaj homoj ĝis plena religia edukado.

La infano fariĝas reĝo— Oni povas diri, ke la unua paŝo "moderna" fontas en la Reformacio, ligita kun la eltrovo de la presarto. Tiam oni opiniis, ke kristano devas ne lerni de la klerikaro, kies morala konduto estis tiam tre kritikebla, sed de la "sanktaj libroj" mem, tio estas per legado. Tial necesis instrui la legadon al infanoj...por la savo de la animoj. La infano restis neperfekta, sed tamen ĝi povis saviĝi per memlernado; tio estas komenco de liberiĝo.

Sed en la 18-a jarcento, la ideoj revolucie ŝanĝiĝis pere de la verkoj de Rousseau (Ruso). Tiu ĉi, kontraŭe al la opinio tiutempa, asertis, ke la infano, kiu estas natura kreitaĵo, estas por tio pli "bona" aŭ "pura" ol la plenkreskulo, kiu lernis el la socio, kie svarmas la malvirtuloj. Tiam la infano estas valora estaĵo, kiun oni devas eduki "nature", por ke ĝi konservu sian virtecon.

Alia paŝo en la sama direkto okazis en la 20-a jarcento, sub la influo de la Freud-posteuloj. Pro la fakto, ke iuj plenkreskuloj malsanas korpe pro iu psika kaŭzo, kiu daŭras ekde la infanaĝo, iuj konkludis, eble tro rapide, ke ĉiujfoje kiam infano ricevas de la socio iun suferon, tiam estas danĝero de psika malordo, kiu poste maskos malsanon. Sub tiu influo, la gepatroj unuflanke, la edukistoj aliflanke, timis malsanigi la infanojn per admonoj, riproĉoj kaj kompreneble punoj.

Mankis tiam, por kompletigi la reĝan kronon de la infano nur la ekonomiaj kondiĉoj; kaj tio okazis en la mezo de la 20-a jarcento en Eŭropo kaj Usono. Tiam kaj tie la industrio produktis amase, dank'al maŝinoj; necesis vendi por repagi la maŝinojn kaj tiu neceso puŝis la produktantojn al amasa reklamado. La profesiaj reklamistoj provas sugesti al la homoj aĉeti ĉion, aĉeti ĉiam, aĉeti ĉiel. La primerkataj studoj montris la gravan rolon de la infano en la familiaj aĉetoj. Tial la reklamistoj provis instigi al aĉeto por la infanoj, fare de la infanoj, pro instigo subtile prezentita de la infanoj. La deziroj de la infanoj iĝis senlimaj. La gepatroj relative riĉaj ne kuraĝas rifuzi ion al infano por ne frustri ĝin kaj okazigi psikan malsanon. Tial kaj tiel, la infano de la riĉa mondo, meze de la 20-a jarcento havas la povon de reĝo.

Kio estas la infaneco, kiu karakterizas la infanaron? La klišo de la jaro por la infanoj

La Eŭropaj popoloj kutimas ligi la diversajn kampanjojn "por la infanoj" al bildoj, kiuj prezentas mizerajn infanojn en la landoj malriĉaj kie la infanoj estas tiel, kiel ili estis en la malriĉaj popoloj ĉu en primitivaj socioj, ĉu en evoluigantaj socioj, kiuj similas al tiu de la mezepoko eŭropa. Kio plej impresas la rigardantojn de la nunaj bildoj, tio estas la kontrasto inter tiuj infanaj mizeruloj, kaj niaj reĝaj infanoj, kiujn mi ĵus priskribis. Inter tiuj ege malsimilaj situacioj, oni rajtas sin demandi ĉu la vorto "Infaneco" havas ununuran signifon.

Sed, eĉ en niaj riĉaj socioj estas mizeraj infanoj. Unuaflanke, ĉar eĉ en ĝenerale riĉa socio estas malriĉaj familioj, sed duaflanke, ĉar eĉ en riĉaj familioj infanoj povas esti mizeraj pro neglekto fare de la gepatroj aŭ pro miskomprenoj psikaj sine de la familio. Tia mizero ne estas fotebla, la korpoj ŝajnas sanaj, sed la psika sano malbona, kondukas aŭ al forlaso de la homa digno aŭ al ribelo kontraŭ la socio: ŝteloj, murdoj, karcero. Ankaŭ tiaj infanoj bezonas nian helpon por esperi al homiĝo.

Kio estas infaneco? La tradicia bildo kontraŭ la psikologia. La infano difinita, kiel nekapablulo.

Tiu bildo kuŝas jam en la etimologio de la vorto: "kiu ne kapablas paroli", kaj estas apogita de la statuso de la infano en

la socio, statuso, kiu respegulas la faktan nekapablon de la infano kondukti tute same kiel homo plenkreska. La jam aludita teorio kristana plunutris tiun bildon: infano, tradicie, estas nekompleta plenkreskulo. Laŭ tiu bildo, pro tiuj mankoj, la socio devas "aldoni" edukon, edukon pripensitan de klera homo, laŭ la plej kleraj religiaj aŭ filozofiaj konceptoj...spite al la tiam nekonataj veraj bezonoj de la infano.

Intuicie, ekde la Renesanco, kaj poste dum la Reformacio, fine en la teorio de Rousseau, oni provis liberigi la infanon de tiu "aldonita" eduko, sed nur la malkovroj de psikologio permesis montri, ke infano ne estas nekompleta homo, sed iu tute alia estaĵo, kiu ne fariĝas homo per sinsekvaj "aldonoj", sed per iom-post-ioma evoluo, kies etapoj naskas apartajn edukajn problemojn.

La etapoj de la evoluo— Unue ŝajnas al mi necese substreki, ke se laŭ ĝeneralaj trajtoj, la evoluo estas la sama por ĉiuj infanoj, tamen laŭ la rapideco, kaj ankaŭ laŭ la diversaj evoluvojoj, tiu evoluo estas speciala por ĉiu aparta infano. Tiu rimarko estas tre grava, ĉar, pro la scienca psikologia deveno de tiu evoluo, kaj aliflanke pro la bezonoj de la socio, oni tendencas konkludi, ke "ĉiuj infanoj estas egalaj" kaj konsekvence, ke oni povas ilin eduki amase, laŭ la samaj metodoj, kiuj nepre devas konduki al la samaj akiroj en la sama aĝo. Tiu simplisma konkludo endanĝerigas grave la tutan organizon de la edukado, sed tio, kvankam tre grava, ne estas la temo de tiu pripensado.

En la unua etapo de la evoluo, la infano, kiu tiam vere similas al la etimologia bildo, povas nur ricevi. Korpe ĝi estas senpova, ĝi nur nutras sin; psike, la infano iom post iom konscias pri sia propra ekzistado disde la cetera mondo. Tiam grave rolas la "patrino" kaj la "patro"; la "patrino" nutras kaj alportas komforton, inkluzive de karesoj, kiuj estas gravaj; la "patro" sekurigas la "hejmon". Komprenibile ne necesas la veraj gepatroj, ne necesas familio; oni povas imagi, ke en orfejo iu vartistino rolas la patrino, kaj iu administranto rolas la patron; sed en tia situacio, reale, ĉiu infano disponas nur pri ono de patrino kaj tute malgranda ero de patro... kiu ajn estu la sindonemo de la deĵorantoj.

En la dua etapo la infano kapablas agi; ĝi sukcesas iri de loko al loko; ĝi provas pli malpli sukcese modifi la mondon (translokigo de objektoj), kaj fine ĝi kapablas rilati kun la familianoj per akiro de lingvo. Tiu dua periodo, kiu transirigas la infanon de egocentrismo al ensociigo, estas kutime la periodo lerneja, en la landoj kie ekzistas lernejoj. La ĉefaj trajtoj de tiu periodo estas la malkovro de la "aliaj"; la nebulaj bildoj de patrino kaj patro preciziĝas, kaj la infano renkontas la geĉatojn kaj la najbarojn, kaj iom post iom lernas la regulojn pri la rilatoj kun tiuj "novaj" personoj. La dua periodo de la infaneco estas tiu de la akiro de kutimoj, kaj lernado de "reguloj". Tio okazas tra la ludoj, tiuj ludoj necesaj, ekzerciĝo preparanta al la estontaj laboroj, kaj ankaŭ al la sento pri respondeco; ankaŭ rilate al la aĝoj kaj al la "aliaj" personoj ĵus eltrovitaj.

En tria etapo, la infano komencas rilati kun la maturaj homoj; ĝi povas eniri en iun profesian vivon meze de socio; sed la problemoj estas: kiu socio?

La problemoj kiuj akompanas la evoluon de la infanoj — Ĉar tiu prelego antaŭas diskuton, mi prezentos problemojn por nutri tiun diskuton, unuflanke ĉar ni povas diskuti nur surbaze de demandoj, aliflanke, ĉar mi scias, ke, pri tiuj problemoj, la opinioj estas tre diversaj; kaj laŭ mia kono, neniu sciencon solvon diskuteblan oni ĝis nun trovis por tiuj problemoj.

Por la unua periodo, la kondutoj de la prizorgantoj, eventuale gepatroj, povas esti, detale, multe diversaj. Sed se oni deziras trovi bazon por diskuti, oni povas ordigi la kondutojn laŭ du kontraŭaj tezoj. Laŭ la unua tezo, optimisma, la prizorgantoj principe fidis pri la "natura", kaj deziras, ke la infano estu kiel eble plej libera. La tuko ĉirkaŭ la korpo estu minimumaj, kaj oni tute ne provas trudi iun ajn kutimon, atendante, ke la instinkto kaj la evoluo de la nervoj, "nature" perfektigu la funkciadon de la sfinkteroj. Laŭ la dua tezo, pesimisma la ĉefa zorgo de la gepatroj estas protekti tiun etan homidon, kaj por plifirmigi tiun protekton oni eventuale limigas la liberecon de la infano. Ne parolante pri la eksmodaj striktaj vindotukoj, tamen ekzistas multaj protektiloj, kiuj pli malpli ĝenas la liberecon de la infano. Sed la plej grava

problemo estas la trudo de kutimoj, juĝataj bonaj fare de la plenkreskuloj, kuracistoj kaj aliaj, sed kiujn la infanoj pli malpli bone akceptas. Al mi ŝajnas, ke la solvoj estas trovindaj laŭ la tujaj kondiĉoj, ĉar, se iuj infanoj tre facile akceptas alkutimiĝi pri io, aliaj infanoj (prave aŭ malprave, kiu scias?) forte kaj konstante ribelas kontraŭ la sama io. Mi opinias, ke, en tiu frua epoko de la vivo, la prudento konsilas agi sen aprioraj teorioj. Jam en tiu periodo, la infano devas esti nek sklavulo nek reĝo; la prizorgantoj devas esti tre adaptiĝemaj, ĝuste tiam, ĉar la adaptiĝo de la infano estas limigita.

Mi jam diris, ke la dua periodo estas signita de la ludoj kaj reguloj. Sed denove estas diskut-areno por du problemoj. Unue, kiel elektiĝu la ludoj? La unua tezo postulas, ke la infanoj mem elektu ĉiujn siajn ludojn, laŭplaĉe, kun nura celo: plezuro. Denove oni esperas, ke la "naturo" aŭ la "bona instinkto" de la infano kondukos ĝin al "bona" elekto. Kontraŭe, oni povas opinii, ke tiu "naturo instinkto" ne estas taŭga por la preparado al socia vivo; kaj tiam oni juĝas, ke al la libere elektitaj ludoj la plenkreskuloj devas aldoni kompletigajn ludojn, ankoraŭ agrablajn al la infanoj sed tamen indajn por socia edukado. La dua problemoj pri tiu periodo estas la fonto de la reguloj. Denove temas pri fido al la "naturo"; iuj opinias, ke la infanoj devas mem eltrovi la taŭgajn kutimojn kaj regulojn necesajn al la socia vivo. Kaj tiel kreiĝas "infanaj socioj", kiuj funkcias pli malpli bone, celas la feliĉon de la infanoj; sed malfacilaĵoj aperas, kiam, vole nevole, la infanoj devas transiri de tiuj artefaritaj socioj (ofte tre forte apogitaj, precipe mone de plenkreskuloj), al la ordinaraĵoj socioj. Pro tio aliaj opinias, ke la sperto de plenkreskuloj nepre necesas por helpi la infanojn en iliaj unuaj paŝoj en socio, eĉ infana. Tiuj opinias, ke la infana vivo devas prepari la infanojn, ne al utopia socio, sed al la realaĵoj de la mondo, pere de informoj liveritaj de plenkreskuloj.

La tria periodo pliampleksigas tiun lastan problemon. Tiam la infanoj, kvankam nekapablaj perlabori sian vivon, kaj pro tio mi nomas ilin infanoj, tamen estas kapablaj kompreni la funkciadon de la socio, la sciencajn informojn, la uzon de la lingvo, la mensogojn de propagando. En la malriĉaj socioj tiu tria periodo okazas kadre de iu profesio, jam elektita sub la premo de neceso. Nur en la riĉaj socioj kaj riĉaj klasoj, la junaj homoj restadas en lernejoj, kie ili povas sin prepari, pli libere, al la

vivo en socio. Sed kiu socio? La edukistoj jam proponis diversajn skemojn, kiujn mi klasigos en tri grupoj.

En la homa socio, kiel imagas ĝin la demokratio, kie la homoj devas agi "virte", laŭ la klarigo de Montesquieu, ĉiu individuo devas pensi unue pri la socio kaj nur poste pri si mem. Tia socio, vole nevole estas religia, ĝi baziĝas sur "kredo": la homo estas bona, la socio estas fondita sur kontrakto inter liberaj homoj, kiuj deziras agi por la komuna bono. Oni kompreneble povas aldoni kroman religion por enŝovi tiun pure homan religion en pli vastan komprenon de la universo. Oni kutime uzas la vorton "religio" nur por tiuj pli vastaj religioj, sed mi deziras substreki la fakton, ke, kiu ajn estu la elektita religio pri la rolo de la homo en universo kaj la kosma signifo de la homa vivo, tamen rilate la pure sociajn problemojn, la "kredo" al "bona homo" kaj paca kunlaborado de la homoj estas necesa por tiu koncepto de "homa" socio kaj eventuale "homara" socio, same kiel ĝi aperas en la zamenhofa "homaranismo". Al tiu modelo oni povas opozicii per "reala" prezento de la socio, tia kia ĝi estas antaŭ nia rigardo.

Restas, kio ŝajnas al mi la plej saĝa sinteno: nenion kredi kaj juĝi nur laŭ la sperto (ĉar en sociologio kaj en politiko la eksperimentoj ne eblas). Kaj, laŭ tiu filozofio, kiun oni povas taksi skeptikismo, la helpo al maturiĝanta infano estus skema la jena:— bona kono de si mem,

— bona kono de la scienca realaĵo (eĉ se ĝi estas proksimuma kaj provizora) kaj tio lasas lokon por fantazio, hipotezi religion, sed tiam "personan" religion oni neniam trudu al la aliaj;

— trejnado je kritiko kaj de si mem, kaj de la kutimoj de la homaj grupoj. Tiu kritiko ŝajnas al mi la plej efika armilo unufланke kontraŭ la "religioj" truditaj de la ĉirkaŭantaroj, religioj kiuj, eventuale bonaj kaj justaj en si mem, tamen iĝas malbonaj pro la trudado, kiu, vole nevole, kondukas al subpremo, ribeloj, militoj, ktp.

Mi provis rapide skizi la situacion de la infanoj en la diversaj socioj tra la tempo, ankaŭ en la nuntempo. Prudentas ne juĝi laŭ la supra aspekto. Ĉiukaze la infanoj bezonas la helpojn de la plenkreskuloj. Kompreneble oni povas longe diskuti pri la formoj de tiu helpo.

Prelego farita de Fernand BOYET
en Grésillon (1979, jaro de la infanaro)

NOBELECO

kaj

NOBELIĜO

Por kompreni la prestiĝon de la vorto "nobelo" - ni devas memori la krucajn militirojn, la armo-metion, la danĝer-alkutimiĝon, la sinoferon kaj sindonemon al idealo, la influon de religio al la agoj kaj konsciencoj; tio premsignis al feŭdismo tiun honorsenton, kiun oni nomis kavalir-ecan spiriton. Kiam multaj ligiloj ekzistis inter vasaloj kaj feŭdomastroj, la promes-faro, la ĵurado alte valoris ĉar ili konsist-igis la socian strukturon. Sed kiam la reĝo Francisko I-a estis akceptita en la kavalir-ordenon fare de simpla oficiro, restis nur malmulte da soldatoj de la "maljuna gento". La malnovaj familioj perdis multajn anojn pro la militoj kaj la starigo de konstantaj profesiaj armeoj ruinigis la feŭdan reĝimon. Estiĝis du tre diversaj specoj de nobeleco: la "genta", origine nobela, kaj la "nobeligi-ta", ne facile distingeblaj unu de la alia. La originaj nobeloj montris, ke la nomo kaj blazono, kiujn ili portis estis tiuj de iliaj prapatroj. Foje ilia origino estis tiel mal-nova, ke oni ne povis retrovi ĝin. Ili iom post iom malmultiĝis dum la nobeligitoj multiĝis. Ek de la XVI-a jarcento nobeleco estis tre serĉata ĉar ĝi fariĝis nur la ekstera aspekto de kio ĝi antaŭe estis; La aŭtenta nobeleco estis milit-devena sed la danĝeraj devoj forŝvenis. La nobeligitoj estis talaruloj aŭ verkistoj. Ili fieris pro sia nova titolo sed daŭre vivis burĝe, komforte.

En 1789 la nobeligitoj konsistigis pli ol la duono de la nobel-deputitoj kaj forte kontraŭis ĉiujn utilajn reformojn proponitajn de la Tria-klaso, kiu parte konsistis el parencoj iliaj. Preskaŭ ĉiuj ankoraŭ ekzist-antaj feŭdnobeloj ne kapablis prui sian devenan ĉenon per aŭtentaj dokumentoj, kiuj fakte ne ekzistis antaŭ la jaro 1400. La modernaj genealogistoj nur supozigas, ke ili konfirmis la ligojn ekzistantajn inter la generacioj de post la unua vera nobelo. Ne estis facile kontroli despli, ke la unuaj veraj nobeloj ne ĉiam estis francaj, sed flandraj, bretonaj aŭ lorenaj. Eĉ aventuraj Italoj, Skotoj, Irlandanoj, kiuj militservis en la francaj reĝaj armeoj ofte kunportis el sia naskiĝ-lando longan genealogion tute ne pravigeblan.

Ĝis la XVI-a jarcento nobelecon rajtis akiri feŭdo-posedanto, milit-profesiulo, nobeloficisto aŭ akirinto de "nobel-letero". Post tiu epoko iu burĝo kiu aĉetis bienon fariĝis "sinjoro" de la loko sed ne nobeliĝis. Tio klarigas la fakton, ke, en Francio, ekzistas multaj nobel-similaj, sed ne nobelecaj, famili-nomoj. Post la XVII-a jarcento restas nur du manieroj nobeliĝi: per nobel-ofico aŭ per "reĝa letero". La francaj reĝoj uzis, eĉ tro uzis, tiun mani-eron pleniĝi sian mon-kofron. La nova "nobelo" plej ofte ŝanĝis sian nomon: ekz. Colbert fariĝis Croissy. Kelkaj markiziĝas antaŭ ol certigi ĉu ili estas aŭtentaj nobeloj. Aĉeteblaj, ankoraŭ nun, estas falsaj ver-aspektaj dokumentoj.

Kio pri la aŭtenta nobelaro? Por ili ĉiam estas pli honoriga deveni de forgesita soldataĉo de la XIV-a jarcento aŭ de bretona ŝildisto posedanto de malgranda feŭdo ol de iu ministro de unu el la lastaj reĝoj. Por la malnova nobelaro ne gravas la titolo; konsiderinda estas nur la famili-nomo. Eĉ ne nobeltitolita, iu familio povis esti unuaranga en provinco. Tra la jarcentoj sinsekvaj feŭdaj sinjoroj transdonis tradi-ciojn. En 1698 d'Hozier, reĝa konsilisto, verkis "blazon-diplomojn" el kiuj kvar aŭ kvin apartenis al burĝoj aŭ riĉaj metiistoj. La prezo estis alta, kaj tiu, kiu pluportos blazonon sen oficiala registrado punpagos altan sumon. Bona fiska afero! Por kontraŭi tiujn arogojn la veraj nobeloj petis de la franca reĝo konfirmajon de ilia malnova titolo. Tiuj "kavalireco-letero" ne estis falsaj sed veraj certigiloj de tre malnova nobeleco kaj parencoj. Ŝajnas, ke nun-tempe nobeloj, kiuj kutime portis nur la familinomon utiligas sian titolon por plifort-igi sian "bildon" okaze de briĝturniro aŭ por seriozigi ekonomian aŭ financon aferon.

Sed la "gentilhommo" ne kontentiĝis per akiro de nobeleco-certigilo. Ĉiutage li vidis en Parizo, sur riĉaj veturiloj, blazonojn kronitajn. Generale temis pri grafo-krono kvankam tiu titolo estis sensignifa. La reĝaj instancoj preteratentis tiun fakton. Ili malpravis ĉar ankoraŭ nun en Francio ekzistas fantaziaj grafoj kaj markizoj. Do nia "gentilhommo" petas de la reĝo la rajton superigi sian blazonon per krono kun "floretoj". La kvinfloreta krono respondis la plej altan titolon, tiun de "duko". La nobeligitoj ne estis modestaj. Post la XVII-a

jarcento aperis nobel-hierarkio sen-historia bazo. Tiun hierarkion oni trovas ankaŭ en la imperia nobelaro konsistanta el militaj, civilaj aŭ religiaj funkciistoj. Tiu napoleona kaporalismo kontraŭis la spiriton de la Malnova Reĝimo. Tiam la bieno estis la nepra bazo de la feŭda aŭtoritato; la titolo "barono" aŭ "vicgrafo" estis ĵaluze konservata en la familioj ĉar konsiderata supera al tiu poste ricevita per diplomo. Sed nur Du centoj el la 3600 restantaj francaj nobelaj familioj estis aŭtentaj registritaj baronaj aŭ markizaj; por ili la titolo esprimas la antaŭan bienan potencon dank'al kiu ili suverene regis en sia provinco. La dosieroj de la franca nobelaro estas deponitaj en la Nacia Arkivejo. La nobeloj ne plu konsistigas juran klason, sed iliaj titoloj estas leĝe agnoskitaj.

La reĝaj distingoj omaĝis familion konsideratan entuta. De post la Franca Revolucio en ĉiuj konstituciaj monarkioj, la suvereno rekompensas civitanon sed la ricevinto ne rajtas pretendi iun ajn privilegion. "Rasa" nobelaro tenanta eĉ nur virtuale parton de suvereneco estas nepensebla en demokrata ŝtato. Iu angla industriisto, generalo aŭ verkisto titolita "lord" estas civitano, kiel la aliaj. La 23-a de junio 1790 Ludoviko la XVI-a subskribis dekreton, ke "la hereda nobelaro estas aboliciita por ĉiam". Kiam revenis reĝo (Ludoviko la XVIII-a) sur la franca trono ne eblis reveni al la formoj de la Malnova Reĝimo. Kelkaj fideluloj estis akceptitaj en la intimecon de la reĝo. La invito renkontis tie marŝalojn, generalojn, altajn ŝtatofunkciistojn. La antikva "spad-nobelego", kies sango miksiĝis kun tiu de la nobeligaro de la Malnova Reĝimo, tiam miksiĝis kun tiu de la imperiaj aŭ restaŭradaj nobeligitoj, ankaŭ kun tiu de la alta burĝaro. La nuna nobelaro estas tiu, kiun la Historio, tra la jarcentoj, modelis: unu el la speguloj de la franca strangeco.

(Artikolo verkita laŭ dokumentoj aperintaj en la libro "Tiel vivis la Francoj" eld. 1961)

LA ROMPITA VAZO

SULLY-PRUDHOMME

La vazon, kie mortas la verben'
Per ventumilo ies man' ekfendis;
L'ekbat' apenaŭ tuŝis ĝin, ĉar jen
Nenia bru' resone sin etendis.

Sed la fendeto tiel delikata,
Kristalon ĉiutage pli mordante,
Sur sia vojo certa, nevidata,
Rondiris malrapide, sed konstante.

La freŝa akvo gutis for silente,
la suko de la flor' elĉerpis sin;
Neniu ĝin supozas ĉi-momente;
Rompita estas, do ne tuŝu ĝin!

Simile man' amata, iafoje,
La koron tuŝetanta, ĝin ekfendas;
La koro poste krevas, kaj malĝoje
La flor' de l'amo pereante plendas.

Por mond-okuloj restas ĝi senvunda,
Sed ĉiam kreskas, kun mallaŭta plor',
Vundeto delikata kaj profunda,
Ne tuŝu ĝin - rompita estas kor'!

Trad. A. GRABOWSKI

LIBRO-SERVO

VALORAJ BROKANTAĴOJ

NICA LITERATURA REVUO
kompleta kolekto : 300 fr.
LA PIRATO (ne bindita)
mankas: 1a serio: 2.3.4.5. 150 fr.

LINGVO "OC"

KAJ ESPERANTO

Tiu artikolo estis verkita kaj sendita al Kulturaj Kajeroj de VALO antaŭ preskaŭ 20 jaroj. Ĉar estas nun diskutata la estonteco de la regionaj lingvoj en Eŭropo ŝajnis al ni oportune denove publikigi tiun artikolon.

IOM DA HISTORIO: En 1539, per la dekreto de Villers-Cotterets, reĝo Francisko 1a ordonis, ke ĉiuj administraciaj kaj ĵuraj aktoj en la tuta reĝlando estu de tiam redaktotaj en franca lingvo.

Dekadenco de la okcitanaj lingvo kaj kulturo: Jam ekde la 13-a jarcento, post la venka krucmilito de Simon de Montfort kaj nordfrancaj baronoj kontraŭ la Albigenoj (kataroj), la okcitana, la glora idiomo de la trobadoroj, regresis kiel skriba kulturlingvo. En la frakasita potenco de mondfamaj brilegaj kulturcentroj, kiel Tuluzo k.a. ĝi iom post iom velkis. Okazis ja kelkaj ekstreboj por ĝin revigligi. Jam en 1323 estis fondita en Tuluzo la "Floraj Ludoj", institucio ankoraŭ vivanta. En la 16-a jarcento oni povis paroli pri "unua renesanco" en Paŭo ĉe la vigla protestanta kortego de reĝino Jeanne d'Albret; en Aikso kun Bellaud kaj aliaj provencaj poetoj. Sed tiuj provoj, limigitaj en rondoj de intelektuloj, restis sporadaj kaj efemeraj.

Dume la franca lingvo, jam de la 14-a jarcento altiĝis ĝis la nivelo de literatura lingvo. En la 16-a okcitanaj verkistoj kiel Montaigne kaj La Boëtiŝ verkis en franca lingvo. La cevenaj hugenotoj legis la Biblion kaj kantis psalmojn en franca traduko. En la 17-a la franca literaturo atingis sian apogeon, sur kiu ĝi de tiam sin tenadas. En Pezenas kiel en Parizo, Moliero prezentis franglingvajn teatraĵojn. En la 18-a Montesquieu kaj Florian verkis nur france. En la 19-a Alphonse Daudet kaj Paul Arène priantis sian belan Provencon en franca lingvo. Same en la 20-a Jean Aicard, Giono, Bosco, Pagnol, Marie Mauron... La Cevenanoj André Chamson, J.P. Cabrol, J. Carrière, k.a. uzis la francan lingvon por glori sian aspran montarlandon.

Tamen la lingvo "oc", en diversaj lokaj dialektoj, estis daŭre parolata. En la 19-a

jarcento la felibroj (tiel sin mem nomis la provencaj poetoj) provis redoni al ĝi ĝian iaman karakteron de skriba kulturlingvo. La movado de ili iniciatita, la "Respelido", rapide disvolviĝis tra la intelektaj medioj de tuta Okcitanio kaj vekis pasian interesiĝon ĉe lingvistoj, filologoj, beletristoj el pluraj landoj trans la limoj de Francio. Sed ĝi ne plene sukcesis, kiel ni vidos poste, pro manko de vera popola bazo.

Nerezistebla ascendo de la franca lingvo - De Francisko 1a al Richelieu kaj al Ludoviko 14a, de la Jakobenoj al la korsiko Napoleono, kaj poste en ĉiuj sinsekvaj reĝimoj, inkluzive la 3an Respublikon kun ties grandparte okcitanaj politikistoj, la ŝtata aŭtoritato plipezigis sian centralizan premadon. La deviga publika instruado de Paul Bert kaj Jules Ferry malpermesis en la lernejoj la uzadon de la regionaj lingvoj rigardataj kiel dialektaĉoj. Sekve de la du mondmilitoj okazis inter la diversaj regionoj de la Francia teritorio popola miksado, kiu favoris la hegemonion de la franca lingvo. Kiam mi loĝis en Paŭo de 1941 ĝis 1947, ĉiuj bearnaj infanoj parolis dialekte, tiel inter si kiel hejme kun siaj gepatroj. Kiam mi tien revenis post seĝpara forestado, ĉiuj parolis preskaŭ nur france. Triumfis la unulingveco en la respubliko "unueca kaj nedividebla". Ĉu definitive?

Motivoj de la centraliza strebado kaj de la etnakultura reagado - Tiu batalado de la ŝtata potenco por trudi ununuran lingvon estas plene celkonscia. La registoj scias, ke la unueco de lingvo estas unu el la ĉefaj kondiĉoj por firmigi la unuecon de homena nacio. Tion komprenis ankaŭ la felibroj. Ilia himno la "Coupo Santo" diras:

De malnova popolo fiera kaj libera

Eble ni estas la finiĝo,

Kaj se falos la felibroj

Falos nia nacio

(Ili nomis "nacio" la okcitanan etnon).

Kaj Mistral skribis: "Kiu tenas sian lingvon tenas la ŝlosilon, kiu el la katenoj nin liberigas". Por kiu libereco? Por la rajto esti diferenca (kio ne signifas malamika; Mistral sin proklamis franca patrioto). Por la libereco konservi kaj kulturi tiun

diferencon kaj resti "popolo fiera kaj libera".

LA KONDIĈOJ POR SUKCESO DE ETNA-KULTURA REVIVIGO: Konsciaj pri la graveco de la lingva faktoro, la felibroj aplikis sian penadon al la tasko ĝin restarigi. Por plena sukceso necesis tri kondiĉoj:

redoni ĝian karakteron de literatura lingvo al la okcitana idiomo, kiu falis en dialektaĉojn, per ortografia reformo kaj purigado de la vortaro, tamen konservante la dialektan diversecon. Tio estis tasko de kleruloj.

redoni al la tiel renovigita idiomo ĝian vivkapablon kiel kulturlingvo, per literatura kreado. Tio estis tasko de estetikistoj, de artaj verkistoj.

rehavigi al ĝi la statuton de oficiala lingvo per truda premo al la registaro. Tio necesigus amasmovadon.

Verko de la felibroj: La du unuaj kondiĉoj estis brile plenumitaj de la felibroj inter ili aparte de la sep "Primadié" (unuaj incitiantoj), kaj inter tiuj ĉi elstare de Frederi Mistral. Li starigis la monumentan "Trésor dou Felibrige", kaj lia lingva laboro, gramatiko kaj vortaro estis ne malpli grava ol la belaj poemoj, pro kiuj li ricevis la Nobel-premion pri literaturo (1909).

Realtigante la provencan idiomon al la rango de eminenta kulturlingvo, li ne hezitis enkonduki en ĝin formen revolucion, elpensante grafion multe pli simplan ol tiu de la trobadoroj, preskaŭ fonetikan kaj influitan de la franca (ekzemple "ou" anstataŭ "o" por la sono "u". Tiu reformo kaŭzis akrajn kritikojn kaj riproĉojn de la purtradicianoj. Tamen mi opinias, ke ne senmotive li, klera, erudicia pri la antikva okcitana literaturo, decidis fari tiun paŝon.

Mistral, burĝe instruita kaj edukita kiel urbanido, volis esti kaj resti proksima al la kampa popolo. En sia dediĉo de Miréio al Lamartino, li sin nomis kampulo kaj en la unua kanto li skribis: "...ĉar nur por vi mi kantas, ho paŝtistoj kaj farmuloj (**pastre e gèn di mas**). Nu la provencanoj el la simpla popolo ja parolis provence, sed ili estis instruitaj pri legado kaj skribado en la franclingvaj lernejoj. Al ili aspektis familiare la mistraloteksto:

Naùtre en plen jour

Voulèn parla toujour

La lengo dou Miéjour (La Respeldo, 1904)

(Ni en plena taglumo

Volas ĉiam paroli

La lingvon de Sudlando...)

Transskribite en la renovigita grafio iniciatita de Loïs Alibert kaj de la Instituto por okcitanaj studoj, tiu sama teksto ŝajnas al ili komplika kaj iel barbara, ĉar ili emus prononci france:

Naùtrei en plen jor

Volem parlar totjorn

La linga dou Miegjorn...

La kaŭzoj de duona fiasko – Nu, malgraŭ tiu peno por meti la lingvon je ilia nivelo, malgraŭ la temoj elektitaj el ilia ĉiutaga vivo, la paŝtistoj kaj farmuloj ne legis la verkojn de Mistral kaj de liaj kompanoj. Ili ja nenion legis, kaj mankis la modernaj disvastigaj rimedoj. La felibroj venis tro frue, en ne matura tempo. Tamen, eble, en la apenaŭ ĝusta tempo por savi la lingvon de definitiva morto.

La tria kondiĉo ne estis efektivigita. Mistral, seniluziigita, skribis en "La Grafino" tiujn amarajn bedaŭrovortojn: "Ha! se ili povus min aŭdi! Ha! se ili volus min sekvi!" Tamen li ne perdis la esperon. En poemo de 1907, publikigita en 1912 en lia lasta poemkolekto "Lis Oulivado" (la oliv-rikolto) li skribis: "Se ne hodiaŭ, estos morgaŭ"...

Do, antaŭ lia morto (1914) kaj longe poste, la tria kondiĉo ĉi-supre difinita por la revivigo de Okcitanio, nome la disvastigo de la etnaj lingvo, kulturo kaj konscio, ne estis realigita. Tiurilate, la revo de la felibroj ne efektiviĝis, kaj ilia strebado fiaskis. La kultura movado ja plu daŭras, la lingvo kaj la literaturo estas prizorgataj kaj kulturataj tra tuta Okcitanio en la lokaj skoloj de "felibre manteneire" (konservistoj). Sed tiu movado restas inter la limoj de klerulaj rondoj.

LA NUNA STATO DE LA DEMANDO

Nova okcitana renaskiĝo – De antaŭ kelkaj jaroj reaperis movado por revivigo de la okcitana lingvo. Tiu nova "respeldo" ŝajnas ne tiel limigita en intelektaj medioj, pli ankrita en la popolo, kies aspirojn ĝi spegulas. Junaj eldonistoj eldonas aŭ reeldonas okcitanajn librojn; sed precipe la profunda popola animo esprimiĝas per la voĉo de junaj kantistoj, disvastigata per diskoj, kiuj atingas pli vastan publikon.

Samtempe kiel la vaskoj, la bretonoj, la alzacanoj, la korsikoj, la katalunoj, la antilanoj, multaj okcitanoj reagis kontraŭ la regadon de la parizaj teknokratoj kaj de iliaj lokaj reprezentantoj, la prefektejaj burokratoj. Al la krio de la montaranoj kontraŭ la armea potenco: "Gardarem la

Larzac" (ni konservas Larzakon) - respondas tra tuta sudlando tiu de pli kaj pli multaj junaj terkulturistoj, kiuj rifuzas dizerti la kampojn de siaj gepatroj: "Volen viéure al país" (ni volas vivi sur la lando).

Etnismo, naciismo, internaciismo, sen-naciismo- Post la progesa procezo, kiu starigis inter la provincoj rivalecojn kaj konfliktojn, profite al la nacia unuecigo, ĉu tiu nova reago estas regresa, reakcia? Ĉu hazarde nun vekiga en ĉiuj regionoj samtempe la novetnisma movado?

La multjarcenta celkonscia strebado de la ŝtatpotenco por firmigi la hegemonion de la franca lingvo povus resumiĝi per slogano: "Unu nacio, unu lingvo". La posta ŝtupo povus difiniĝi: "Unu Eŭropo, unu lingvo", kaj la fina: "Unu homaro, unu lingvo". Tio estas la celo, malproksima, de la sennaciistoj. Ĉu en ĝia nomo ni kondamnu la etnisman movadon kaj la revivigon de la mortantaj etnaj idiomoj? Se ni rigardas la naciismon kiel plej grandan malbonon, kaj la naciojn, jam nun, kiel anakronismajn, ni bonvenigu ĉion, kio kontribuas al malplifortigo de ilia suverena potenco. Sur la kampo de ekonomiaj kaj sociaj konkretaĵoj, ĉiu urbo, ĉiu vilaĝo havas proprajn problemojn, pri kiuj ĝi decidu mem sen interveno de la ĉefurbaj instancoj. Ĉiu regiono devus aŭtonome pritrakti siajn komunajn aferojn. Por tiaj temoj la nacia kadro estas tro vasta. Por multaj aliaj ĝi estas jam tro strikta. Kiel demonstras la mondcivitanoj, la tutmonda homaro estas solidare alfrontata al demandoj, kiuj povas esti nur mondscale solvataj. Anstataŭ "unio" de nacioj, t.e. konfederacio de suverenaj regnoj forte armitaj por konservi danĝeran ekvilibron, devus regi federacio de interdependaj regionoj, mem konsistantaj el federacioj de komunumoj.

En tia skemo ĉiu regiono plej racie ekspluatas siajn naturajn rimedojn kaj la homara solidarsento kondukas la plej evoluintajn popolojn al helpado por altigi la aliajn ĝis sia vivnivelo. Cetere, favore al ĉies intereso, ĉar daŭra troa malegaleco kreas danĝeron pri konfliktoj kaj eksplodoj

Kultura aspekto de etnismo - Jen do pri la materiaj vivkondiĉoj. Koncerne la spiritan vivon, la etnoj (kies teritorio ne ĉiam koincidas kun tiu de natura regiono) diferencas inter si laŭ kulturaj formoj: tradiciaj penskutimoj, frazkonstruoj, esprim-

manieroj. Eĉ la folkloro ne estas seninteresa, ĉar la etnaj kostumoj estas bone adaptitaj al la klimato kaj laborkondiĉoj, kaj la tradiciaj rakontoj, kantoj, muzikoj, dancoj, enkondukas en la esprimadon de pensoj kaj sentoj, funde komunaj al la tuta homaro, riĉan variecon en la formoj. Same estus malsaĝe hereze konstrui normandian vilaĝon en Provenco, aŭ provencajn - "masojn" (farmdomojn) en Flandrio aŭ en Aŭvernjo. La tutmonda ĝeneraligo de samstilaj beton-muroj kaj -turoj estas aflikta, same kiel la "blugina" uniformo efikas ridinde.

Malfacila batalado - La nova etnismo kontraŭbatalas la procezon, kiu pli kaj pli rapide unuformigas la tutan homaron laŭ la modelo de modernaj usonaj urbanaroj, pere de la "mass-media" kaj de la kreskanta hegemonio de la angla-usona lingvo. (Cetere, ne sen malavantaĝo por la angla lingvo mem, kies purecon ĝi endanĝerigas. Pri tiu danĝero estas tre konsciaj kelkaj anglalingvaj kleruloj). Jen estas kultura imperiismo, kontraŭ kiu necesas ekstar, same kiel la industria kaj komerca imperiismo. Esperanto estas la plej taŭga ilo kontraŭ la lingva imperiismo de la usona lingvo.

Esperanto kiel helpa kulturlingvo - Ĉu Esperanto, por kiu ni ambicias la rolon de organo de la tutmonda kulturo, prezentas danĝeron oor la naciaj lingvoj? Ni konstatas, ke tiuj lingvoj posedas riĉan literaturan trezoron, tutmonde konatan pere de tradukoj. Ĝamen, kelkaj malgrandaj nacioj ne konsistigas sufiĉe multopan legataron por financi eldonojn en sia lingvo. Al tiu demando esperanto alportas praktikan solvon, ebligante unu nuran tradukon por pluraj kaj multaj diverslandaj legataroj. Oni povas kontraŭdiri, ke la esperantista publiko en la tuta mondo estas ankoraŭ pli malmultopa ol tiu de iu ajn malgranda nacio. Unue tio ne estas tute certa. Due estas fakto, ke eble dank'al malavareco de la esperantistaj eldonistoj, jam nun tiu publiko disponas pri kelkaj verkoj kaj antologioj ne haveblaj en aliaj lingvoj. Ne estas danĝero, ke la naciaj kulturoj perdiĝus per malapero de la nunaj naciaj lingvoj. Sed, eĉ se tiuj lingvoj mortus, kiel mortis la antikvaj greka kaj latina, iliaj majstroverkoj estus savitaj pere de esperantaj tradukoj.

Alie estas pri la etnaj idiomoj, la regionaj dialektoj. Ĉu ĝi prosperos aŭ ne, la

nuna movado por ilia revivigo estas utila, ĉar ĝi permesas, eble "in extremis", savi de forgeso ilian altvaloran kulturtrezoron.. Por ili Esperanto povas ludi la rolon de neŭtrala interligilo. Kiel vehikla lingvo ĝi ebligas reciprokajn riĉigadon per interŝanĝoj sur bazo de egaleco. Tiel "la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian". Tiel la tutmonda kulturo efektiviĝos; ne per senkolora unuformeco laŭ unu modelo, ne en monotona grizaĉo, sed en bunta diverseco. La originalaj formoj, ame konservataj kaj kulturataj, ne restos apartigitaj en la limoj de siaj respektivaj teritorioj, sed en harmonia kunekzistado, ili sin interpenetras kaj reciproke fekundigos.

Resume:- la etnaj idiomoj havas profundajn radikojn en grundo. Ni defendu ilin.

-la naciaj lingvoj, per historia procezo akiris vastan kulturen bazon. Ankaŭ ilin ni defendu.

-Esperanto estas ideala ponto-lingvo inter ĉiuj idiomoj. Ni disvastigu ĝin.

Esperanto estas la natura esprimilo de tutmonda eksternacia penso kaj sento. Ni eltrovu kaj elvolu ĉiujn ĝiajn latentajn eblojn.

LINGVO "OC" KAJ ESPERANTO - En Okcitanio en la lastaj jaroj estis publikigitaj diversaj antologioj de poemoj de mezepokaj trobadoroj, kaj pluraj verkoj de la ĉefaj felibroj estis reeldonitaj. Jen estas nova kampo plugenda de niaj tradukistoj.

La verkoj de Mistral estas de li mem francigitaj, sed, krom parte Miréio, ili ne estas mondscale disvastigitaj per alilingvaj tradukoj. Almenaŭ Miréio kaj Calendal, alia majstroverko kvankam malpli fama, meritus esti diskonigitaj per la lingvo universala. Ni signu tiun taskon al okcitanaj esperantistoj. Pri Mistral-verkoj, speciale al provencaj samideanoj, bone scipovantaj sian lingvon kaj kapablaj korekte kaj lerte esperantigi ĝin. Mi mem provis doni modestan ekzemplon atakante la plej facilan, la "Pouemo dou Rose" (Poemo de Rodano). Multe pli malfacila estus la esperantigo de la rimitaj poemoj Miréio kaj Calendal. Por ĝin kontentige efektiviĝi necesus la talento de iu provenca Kalocsay aŭ Waringhien.

Felibroj kaj Esperantistoj - Ĉiam estis simpatio inter ambaŭ medioj kaj movadoj. Pluraj felibroj estis ankaŭ aktivaj esper-

antistoj. Kuraĝiga estas la ekzemplo de tiuj gloriindaj antaŭuloj. Inter ili ni menciunuavice Valère Bernard (1860-1936) marsejano, provenca kaj esperantista poeto. Tre modesta, li ne ĝuis vastan famon. tamen li estis "felibre majourau" (alta grado en la hierarkio), kaj eĉ estis iam elektita "Capoulié dou Felibrige", la plej alta grado, tenata sinsekve de unuopuloj depost la unua, Mistral mem. En la esperantista movado li elvolvis tre efikan aktivecon meze de la marseja grupo, kies ĉefa animanto li estis. Aliaj esperantistaj felibroj estis Paul Champion, avinjonano, tradukinto de la tri unuaj kantoj de Miréio, Contancin, Aiksano, kapitano Martin el Nico, Louis Laget animanto de la arleza grupo, fondinto de la bela, efemera revuo "Tra Provenclando

Mistral kaj Esperanto - Jam mi aŭdis jenan anekdoton: En 1909 la tri unuaj kantoj de Miréio estis esperantigitaj de P. Champion kaj Dro Noël. La du tradukintoj iris al Majano por prezenti sian tekston al la aŭtoro. Unu el ili laŭtlegis ĝin. Post kelkaj strofoj Mistral interrompis lin: "Vidu, sinjoroj, mia hundo ĉiam bojas, kiam ĝi aŭdas paroli france. Nun vi parolas esperante, ĝi atente aŭskultas kaj ne bojas". Kiu iam aŭdis el la buŝo de aiksano aŭ de arlezanino tiun provencan idiomon, unu el la plej belsonaj en la mondo, tiu komprenas, kiel granda komplimento pri la belsoneco de esperanto kuŝas en tiuj vortoj de la plej alta kompetentulo. Tio kuraĝigu nin, provencajn esperantistojn; ni sentime asertu, ke esperanto plej taŭgas por traduki sen troa malfideleco la juvelojn de nialanda literaturo.

VALO



FRÉDÉRIC MISTRAL. — CL. E. CHAMBERLAIN.

NEATENDITA DESTINO

"Eĉ ne kvinminuta kvieto! Malbenindulo!"

S-ino Poŝar, la pordistino, trolacigita, malfermas sian pordon tremantan pro la frapoj. S-ino Fabio, la luantino de la 3-a etaĝo eniras, duonfrenze.

"Zulu, mia eta Zulu mortis!"

"Ĉu pro via hundaĉo vi tiel freneziĝas?"

"Hundaĉo? Jes mia hundo, mia eta Zulu..."

Kial ni devas disiĝi?"

"Nu, pajloŝtopu ĝin!"

"Pajloŝtopi mian karuleton? Vi estas senkora, s-ino Puŝar!"

"Jes ja, mi estas bonkora. Sed mia filo estas militkaptito. Do, vian prihundan rakonton mi prirafjas. Estas pli grava okazaĵo nuntempe"

"ompreneble, kompreneble. Sed mi estis tiel korigita al ĝi. Mi ne sukcesas konsenti pri definitiva disiĝo. Mi volus...Mi ne scias, kion mi volus...konservi ĝin, eĉ nur iom da tempo".

"Pajloŝtopigu ĝin. Aŭ iru al la hundo-tombejo en Neuilly"

"Al Neuilly? Jes. Tiamaniere mi povos viziti ĝin ĉiutage kaj porti al ĝi kelkajn florojn. Ĝi ne estos sola, meze de kunuloj."

Denove S-ino Fabio ekploras. S-ino Puŝar ŝultrolevas kaj reiras al siaj kaseroloj. Ŝia citrolo-deserto riskas kuirbruli pro tiu senutila konversacio.

S-ino Fabio rehejmeniga. Ŝi intencas rapidi, ĉar ŝi iom timas. Ŝi volas konservi bonan memoron de sia Zulu. Ŝi ne volas ĉeesti la insideman atakon de la tempo. Eble estos formalaj plenumotaj. Oh! per mono... Sed kiamaniere transporti la kadavron? Nu, en valizo, kompreneble. Ĝus dirite, jam farite. S-ino Fabio foriras... post iom da sinbeligado; la koketeco de virino kvardek-kvin jara ne senvalorigas, eĉ pro la plej kruela funebro.

S-ino Fabio rapidas en la koridoroj de la metro-stacio "Anvers". Alvenas trajno. Ŝi envagiĝas. Ŝi devos ŝanĝi en "Etoile". Ŝi taŭzas kunvojaĝantojn; la valizo ekbatas tibiojn kaj maleolojn. Fine, premata, firme tenanta la valizon, ŝi penis trovi ekvilibron; ŝia korpo lante kaj elaste balanciĝis laŭ la movoj de la kvazaŭ gelatena hom-amaso. Povra Zulu! En valizo! Larmoj venas al ŝiaj okuloj. Ne, ne pluru. Atentu la okulŝmink-aĵoj! la konvojaĝantoj scias nenion pri la valizentenaĵo. Tamen sinjoro, kojnumita inter kampadsako kaj dorso de policisto, ofte ekrigardas la valizon. Kio? Kion li

volas? Ĉu...? Ne, mortinta hundo ne permesas al si maldecaĵon en la metroo. Precipe Zulu! Tamen ŝi maltrankviliĝas; Ĉu Zulu vere mortis? Ĉe la stacio "Villiers" ŝi ne plu povas elteni kaj elvagiĝas. Ŝi metas la valizon sur benko duonkaŝita de ĉokolad-distribuito. Kun batanta koro ŝi malfermas ĝin. Ve! La karuleto vere mortis. La kovrilo falkaŝas la etan rigidan korpon. Kun larmo-vualitaj okuloj kaj tremetantaj lipoj s-ino Fabio eniras la postan vagonaron. Eleganta junulo flanken ŝovas sian valizon por lasi lokon al tiu de s-ino Fabio. Ŝi palridetante dankas. Ĉe la stacio "Etoile" la vagono elflue malpleniĝas. S-ino Fabio sukcesas kapti sian valizon antaŭ ol esti puŝata eksteren. Sekvas la junulo, kiu baldaŭ aliĉdirektiĝas. Finfine Neuilly! Ĉe la pordo de laombejo, s-ino Fabio deziras havi lastan ekvidon de sia kara Zulu. Ŝi gardeme levas la fermoplaton...kaj allasas ĝin: sur la trotuaro kuŝas bela porko-femuro. Kaj la tie deĵoranta policisto devontigas sin konduki s-inon Fabio al la policejo, ĝemantan kaj mirstultigitan. Malpermesita estas la "nigra merkato!"

Paŭlo Randal, ĝoje supren rapidas al sia apartamento. Kia afero! Kolego diris lin, ke li povos havi viandaĵon en malgranda kafejo en Montmartre. Li eĉ trovis ion ankoraŭ pli neatenditan. Vere nur la stultuloj ne sukcesas elturniĝi. Ĉio estas trovebla sed oni ne ŝparu sian penon... nek sian monon! Li premas la sonoril-butonon. Johanina saltas al li vidante lian radiantan vizaĝon.

"Nu? Ĉu vi sukcesis?"

"Mirinde karulino. Mi alportas...Divenul!"

"Ne atendigu min! Malfermu, malfermu!"

Fikse rigardante sian edzinon por ĝui, ŝian ĝojoplenan vizaĝon li malfermas la valizon, triumfe anoncanta: "3000 frankojn kaj sen kuponoj." Johanina pensis, ke ŝi mortos pro timo La ŝerco estas ege maldeca. Kaj Paul sukcesas balbuti, rigardante la hirtan harbulon, kiun li alportis: "Mi certas, ke estis ŝinko."

Jen kial Zulu nun "travivas" aventurplenan morton en la rivero Seine, anstataŭ ripozi en la kvieto tombejo de Neuilly. Mankas voĉo en la nokta eltomba koruso de la diversfelaj fantomoj.

POR VIA DISTRO

ENIGMO

Grava verko reeldonita en 1980. En kvadratoj 1-23 estas la titolo de la verko, en 24-38 la tiama eldoninto.

1	2	3	4	5	6	7
8	9	10	11	12	13	14
15	16	17	18	19	20	21
22	23	24	25	26	27	28
29	30	31	32	33	34	35
36	37	38	39	40	41	42

La respondojn skribu en tiujn kvadratojn, en kiuj troviĝas la samaj numeroj kiel post la demando.

1. Reproduktaĵo /sama kiel la originala/ 5, 7, 8, 25, 23.
2. Riverego en Afriko 36, 11, 24, 12.
3. Perdo de la vivo 34, 35, 28, 22, 38.
4. Nevola seniĝo de posedaĵo 17, 27, 32, 10, 7.
5. Mal-jes 2, 15.
6. Balta lingvo 6, 20, 26, 31, 33.
7. Tre malgranda 14, 30, 29.
8. Prepozicio 16, 1, 21.
9. Oni devas jene kondukti 13, 9, 3, 18.
10. Montro de subita gajeco 19, 4, 37, 12.

I. Nagy.

SOLVO DE LA ENIGMO

serĉas + 24	E	batas	malta kaj konciza	T	baso kaj bavaro	malta kaj konciza	serĉas	A	perdo de la vivo	O	perdo
la ti stacio de Ede...	M	A	L	R	A	P	I	D	E	G	A
mal je juna	B	R	U	J	adverbo	I	A	M	R		
fajro kaj konciza	A	M	A	L	G	A	M	I	G	O	S
sur la domo verbo	R	I	S		mal grand- agulo	N	A	N	O		
	M	A	L	F	I	D					
mal konciza	S			O	P	I	N	I	S	O	N
mal konciza	A	J		O	K						
mal konciza	E			K	A	D	R	O			
	S	A	N	K	T	O	L	E			
	C	A	R		R	E	K				
	A	N	E		P	O					
	J		D	I	A						
	K	A	N	A	N	P					
	R	E	N	O	M	I	G	I			
	O	K	T	A	N	A					

PROTOKOLO

Malfermo je la 10a30 - Ĉeestas: Dominique BABIN (dB), Claudie BUREAU (cIB), Guy DAIRON (gD), Danièle GOURDON (dG), Georges LAGRANGE (gL), Paulette NAULET (pN), Christian RIVIERE (cR), Jeannine VINCENT (jV). -Henri BOYET; M.T. LLOANCY sendis rajtigilojn. Suzanne BOUROT senkulpigita. La kvorumo estas laŭstatuta. Tagprezidantino: Paulette NAULET - Protokolanto: Georges LAGRANGE.

Laŭ la tagordo:

I-APROBO, SUBSKRIBO de la PROTOKOLO de la KUNVENO 1999 05 01.

D. Babin ne kunportis la protokolon. Estis antaŭvidita Ĝenerala Asembleo je la 3/7/99. Ĉi tiun punkton oni devas nuligi sur la protokolo (ne jam subskribita) ĉar la kunvokilojn, oni ne dissendis. Tial la ĜA ne povis okazi. Koncerne "modifon de statutoj" (kolektiva direkcio, sen persona prezidanto) neniŭ respondo de la notario.

II-TASKOJ - 1-STAGŬ-PROGRAMOJ: Pri tio zorgas M.T. Lloancy kaj G. Lagrange.

2-FINANCO: Se Danièle Gourdon oficiale demisios (31aXII 99?) prenos la respondecon J. Vincent kaj G. Dairon.

3-ETIKEDOJ/ADRESOJ: Ch. Rivière kaj H. Boyet povas repreni la komputikan sliparon. dB havas viruson en sia komputilo..

x x

III- KIO OKAZIS depost la pasinta kunveno?

1-VIZITO de la Fervojistoj post ilia kongreso en Le Mans. Donacoj ĉirkaŭ 2000F

VIZITO de la fajrobbrigado: raportas pN. Arangoj faritaj estas "en conformit "; Ĉiukaze ne estas hejtado en julio/aŭgusto. Sed oni devas aranĝi ventoladon en la pordo (truoj supre kaj malsupre) se oni hejtas. Fareblaj de neprofesiuloj. Oni postulu de la entreprenisto "Ateston pri Konformeco", subskribitan. Sed la entreprenisto postulas 11000Fr por tion fari. Fajroestingiloj: sufiĉaj. Unu estas relokota. Murlampoj ne taŭgaj. Instal aliajn, kiuj ŝirme kaŝu la dratojn (Laboro farebla de neprofesiuloj - materialo aĉetebla, malpli koste, en granda vendejo.) - Kuirejo konforma ĝis 20kw. Gaso: du flamoj (feux vifs) kaj unu varmiga plato (Ebleco kuiri por eta grupo) - Hejtejo: la hejtokaldronoj devas esti muntitaj ekstere.

3- PROAKVAJ DAMAĜOJ: likado de akvotuboj en la loĝejo de geBabin post la laboro de la tubistoj. MAIF repagos ĝis 3500Fr da riparoj. Ebleco farigi la riparojn far neprofesiuloj (Przemek?)

4- PARKO- raportas cIB. Laŭ la vortoj de specialisto estas kelkaj kverkoj negocebaj, ankaŭ kelkaj poploj kaj pinoj. Unua evaluo: 5000 ĝis 6000Fr. Dua evaluo de arbarspecialisto: 20000 ĝis 30000Fr. Prizorgi (flegi) la arbaron? Vidi kun specialisto. Elekti arbidojn, protekti ilin per tuboj. Provizore ĉesigi kontrakton kun la arbhakistoj.

IV-FINANCA SITUACIO - raportas dG.

Je la 30a de aprilo 1999: C.C.P.

106 399Fr.

C. N. Epargne

186 047

Banque Pop.

30283

73 456

Cr dit Ag.

26 114

Post pago de diversaj fakturoj, en kaso: 431 679Fr.

Estas notinde ke tiu sumo konsistas ekskluzive el DONACIOJ POR SAVLABOROJ. La kapitalo propra de Greziljono estas elĉerpita.

V- HERBEJOJ - Ne falĉitaj ĉijare. CAT proponas falĉadon por 2400Fr. Laŭ cIB-edzo, ili lasas la fojnon surloke: danĝero. Terkulturisto povas falĉi kaj forpreni la fojnon senpage, eĉ iom pagi se ĝi estas ankoraŭ freŝa. cIB-edzo studos la aferon - gardenisto por p fizorgi la florojn. Dekmilfrankojn por la jaro.(??)

VI-PREZPROpono (ANTAŬFAKTURO) de la ARĤITEKTO

Savŝtuparo por 57000 (anstataŭ 80000)

kaj masonaĵoj

kaj fajrobremasaj pordoj (portes coupe-feu)

entute 182000Fr.

Subskribe konsenti pri la propono.

Ĝin submeti al la sekurkomisiono

Se akceptita: komenco de la laboroj en sept.99

Do ebleco uzi la unuan etaĝon venontjare

Kaj plani la staĝojn jam en januaro 2000.

Kromaj avantaĝoj: (diplomatiaj)

Favora opinio de la urbestro de Pontigné.

Labordono al la urbestro de Baugé.

Ĉiuj ĉeestantoj subskribas la prezproponon de s-ro Marteau. Farbolaborojn povos fari skipo de neprofesiuloj.

VII- Roseline BACHELOT- raportas CH. Rivière. S-ino Bachelot, deputitino de Maine-et-loire, vicprezidentino de "Conseil Régional."

Favore rigardas al Gr. Estas en rilato kun Enderby (UEA)

Kiom vi bezonas? Petu almenaŭ 180000Fr. Ni proponu laborojn por ĉirk. 300 000Fr.

Ĉu prefere alnormigo de la etaĝoj (radiatoroj) aŭ la kuirejo? Post diskuto: la kuirejo.

(La vapora hejtado ne estas eksternorma: nur 0,1 "bar")

VIII x x x

IX- ĜENERALA ASEMBLEO EKSTERORDINARA KAJ ORDINARA:

Dimanĉo 31a de oktobro, 10a horo - Lundo 1a de novembro: Komitat-kunveno.

Oni voku al kandidatiĝoj por vakantaj postenoj. dG se eksiĝos, kiel komitatano povus esti "teknika konsilantino".

X- JOGANOJ- Laŭ propono de Lavarenne (Pau) organizo de joko-staĝoj en Gr. far aparta joko-grupo. Atenti, ĉu temas pri "sektio"? Ĉu ili povas finance helpi? Akcepti la viziton kaj pristudi la problemon sen antaŭjuĝo.

XI- RILATOJ KUN UEA. Raportas G. Lagrange Sekve de leter-interŝanĝo kun R. Corsetti, ni ricevis de UEA la promeson ne de rekta financa subteno sed de helpo, per senpaga enpresado de tupaĝa reklamo en la jarlibro (kion ni povas mem konstati); per disponigo de senpaga budo dum la UK en Berlino.. Estas decidite, ke oni preparu materialon por tiu budo. ĉR povos transporti parton de tiu materialo.

XII-RADIO-AMATOROJ- Informas D. Babin. J.J. NOËL prezidanto de la radio-amatoroj anoncas, ke li ŝatus transloki la sidejon de ilia asocio de Greziljono, al lia propra loĝejo en Montmorillon (Vienne). Estas neniu kontraŭstaro al tiu propono. Ĝi estas unuanime akceptita

La protokolanto estas petata sendi ekzempleron de la protokolo al Pierre Babin (kulturaĵkajeroj) kaj al Henri Boyet.

La kunveno finiĝas je la 15a30.

La protokolanto: Georges LAGRANGE

ALDONE: Rimarkoj de M.T. Lloancy - Ne konsentas pri nuligo de iu ajn decido de la antaŭa kunveno.- "...loĝejo de Ge.Babin" proponas, prefere "...la t.n. Babin-loĝejo". Pri falĉado: la falĉado estu nepre farita ĝis la alveno de la kampadantoj.- Propono de Lavarenne: Ĉi-lasto ne estas Paŭano, nur lia informo transiris tra M.T. Lloancy el Pau.

x x II.4- DOMOJ / KONSTRUOJ: Ĉar loĝantaj plej proksime, Paulette Naulet kaj Claudie Bureau respondecu pri rilatoj kun SOCOTEC kaj la arĥitekto.


x x x VIII - STAĜOJ 99 - Minimume 27 partoprenantoj (el 4 nacioj). Pluraj informpetoj. Ni povos kuiri mem en la kastelo; tag- kaj vesper-manĝoj 45fr. sen vino nek kafo. - matenmanĝo 20 fr.

GRAMATIKO PER BONHUMORO



Konservo de O-finaĵo


- 1) **por belsoneco**
majstro-verko ; arbo-branĉo ; kudro
maŝino
- 2) **por klareco de la senco**
diosimala ; luodomo
- 3) **por eviti konfuzon**
feokanto (fekanto)- virotemo (virtemo)
orodono (ordono) inoformo (informo)



Kara Samideanino :


Por ĝoje festi Novan Jaron mi invitas vin hejmen. Mi preparis por vi juvelojn perlamotoriĉajn. Mi montros al vi mian kolekton pri konkajĉoj. Kaj ni festenos per plej variaj konkajĉoj.

Kompreneble ne timu, ke tiu konkludo konduku nin al nehonesta konkludo !



Dilemo :

Plej miregige estas pensi, ke ili estas de la sama artisto ! Mi intencas doni al mia edzino, de kiu mi ricevas tiom da edzinaj kontentigoj, unu el tiuj artaĵoj. Tamen mi hezitas... Edzino-kontentigo estas tiel delikata afero !



Marsaĵoj !

“ Kristnasko-Patro “ el Marso ĵus elfuzeiĝis en nian halon. Kun plezuro mi prezentos al vi, karaj infanoj — kaj al vi modernaj gepatroj —, la tieajn plej mirigajn ludilojn kaj kreaĵojn!

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).

Belgio : Librovendejo Kariljono, vzw Doornstraat 22. 2610 Wilrijk Akceptas kreditkartojn - prezo : 600 BEF.

Britujo : Les Hartridge, 74 Devonshire way, Croydon CRO 8 BS (10 pundoj)

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (90 kronoj).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (70 mk.).

Germanio : A. Rudolf, Dochsbergstr. 1, D. 34225 BAUNATAL pĉk Frankfurt / M (2759 35 - 609)

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10^a-D 03003 ALICANTE - (1 700 peset.).

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (20.000 liroj).

Japanio : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaši-Nakano, Hatiōziši TOKYO-

Jugoslavio : Jelena Andjelkovic, Nova 61/1, YU-11213 Beograd

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (28 fl.).

Nov-Zelando : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 18 n.z.dol).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, ul. Krucza 38/42 00512 VARSOVIO (15 us. dol.).

Portugallio : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. João Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboa (2.800 esk.).

Svedujo : Sveda Esperanto-Asocio, Södra Rörum, pl. 455, S-242 94 Hörby - p.k. : 2012-3 (80 kr.).

Svislando : Esperanto Perkoresponde, Claude Gacond, strato Chevreuils 14, CH-2300, La Chaux-de-Fonds, PK.23-4669-1 (22 s.f.)

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale lajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

- Por ripozl trankvile en atmosfero frateca ;
- Por ekterni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempe ;
- Por ekskursi tra centro-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponaro al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 02-41-89-10-34